Kongresa numero 8.

„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Jarabono (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, engebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 8 (133 en la vico) | Korneuburg ĉe Wien, la 5. de aŭgusto 1936. | 13. jaro

La Kongreso de la patriotaj Kosmopolitoj.

Forte subtenate de ĉiuj oficialaj rondoj kaj aŭtoritatoj kaj invitite de la registaro Aŭstria La XXVIII. Universala Esperanto Kongreso 1936 okazos en Wien, en Aŭstrujo. Decas do, ke loĝanto, eĉ indiĝeno de tiu ĉi favorita regneto esprimu sian kaj de siaj samlandanoj ĝojon pri tiu ĉi distingo kaj honeco, montri al niaj samideanoj kaj simpatiantoj en la tuta mondo, ke ni iel ankaŭ meritas ĉi tiun felicon.

Unue-kaj tio estas la pure esp-ista flanko de l' afero, ni havas fervorajn gesamideanojn, kiuj ĉe la kompetentaj rangoj de nia hejmlando jam multon atingis por Esperanto. Mi mencias p. e. la instalon de ŝtata ekzamenkomisiono 1925; la fondon de Internacia Esperanto Muzeo en Wien, kiu instituto baldaŭ fariĝos unu el la plej gravaj entreprenoj de l'Esperantismo; la uzadon de E. en la trafiko de poŝto, fervojoj, foiroj, policо; fine la komence de ĉi tiuj linioj konstatitan akceladon de nia 28 a.

Due. Nia lando povas regali la vizitontojn per saniga ripozo en plej diversspecaj kaj ĉiam belegaj regionoj. Vi povas promenadi sur arbarriĉaj montoj kaj montetoj, en ombraj aleoj kaj parkoj, grimpi sur pitoreskaj kalkmontegaroj kaj mildkonturaj, herbejkovritaj montegoj kun bonodoraj alpfloroj; naĝi en varmaj montarlagoj; migradi per bicikloj kaj aŭtomobiloj sur bonegaj ŝoseoj; veturi per boatoj kun remiloj kaj veloj sur riverego kaj riveroj, lagoj kaj lagetoj, per vaporŝipo sur Danubo kaj lagoj, kajaki sur torentoj; admiri abundan kulturon harmoniigitan kun moderna civilizacio k. t. p.

Trie. Vi renkontos loĝantaron kompreneman por ĉies specialeco, gastaman kaj gajan, ĉar ĉi tie en la mezo de Eŭropo, travagita dum jarcentoj de la plej diversaj popoloj, distiliĝis ties bonaj ecoj je produkto, kiun bezonos la estonta Paneŭropo por felica ekzistado. Ni aŭstrianoj kore amas nian karan patrujon sen malamo kontraŭ iu alia nacio, kiun ni ŝatas laŭ ĝia ŝatindeco, memorante la konfeson de nia fama poeto Peter **Rosegger,** kiu skribis: Patriotismo ne estas malamo kontraŭ fremda, sed amo al la propra nacio. Do, ni Aŭstrianoj estas patriotaj kosmopolitoj kaj invitas la samopiniantojn en ĉiu alia popolo, festi kun ni la kongreson de patriotaj kosmopolitoj por manifesti la solidarecon de animoj en la grandaj aferoj de la tuta homaro, la ĉefkunvenon de **Ligo de la koroj de nacioj.**

D-ro Adolf **Halbedl,** Ried i. I.

Al 28 Universala Kongreso de Esperanto-Loka Komitato en Vieno.

Respondo de Leo Belmont je letero de 29./V. 1936 (en ritmo de Puŝkina „Onegin“).

1.

Vi en Vien', Vi en Vieno,
Karega samideanar'!
Letero Via — florĝardeno
De l'ambrozi' kaj de l'nektar'
Portas mielon, bonodoron,
Dankeme tuŝas mian koron,
Vekas sopiron per la son'
De la ĉarmanta Vindobon' ...
Min veturigas jam duone
Via atent' kaj flata tent' ...
Flugiloj de l'facila vent'
Jam kaptis min ... Sed ne persone!
Kun Vi mi estos per anim',
Sed ne per Korpo — plendas rim'.

2.

Se estas ver' evangelia,
Ke montojn ho! transportas Kred' —
Haltigas min senkredo ia,
Kvazaŭ en stato de graved' ...
Ke mi ne inde Vin salutos,
Ne „oratoros“, sed balbutos,
En inaŭgur-Kongres-vesper'-
Severe flustras malesper' ...
Ne estas mi „predestinita“,
Nek „kompetenta“ ... En leter'
Estas nur unu bela ver',
Ke mi, felica — (ne merita!)
Ektuŝis iam per la man'
La Majstran manon — veteran'!

3.

Nun, veterano mi — sen forto,
Sen sankta fajro, sen talent' ...
La malkredul'! ... Maldolĉa sorto
Min ne transportos, laŭ la tent',
Al la palacoj Vindobonaj
Al kamaradoj, junaj, bonaj,
Al sankta Domo de Stefan' ...
Ne-ebla estas Via plan' ...
Tamen ne moku di'-Mamono,
(Terura estas ĝi sekret',
Kaŝita kun la hont' kaj ted'),
Ke mankas nur malsaĝa mono,
Por ke vojaĝu mi sen pen'
Kaj jen aperu en Vien'!

4.

Polus' ja volus esti Polo,
Se ne malhelpus ŝanĝ-akcent' ...
Franc-maniere ĝia volo
Restas en „polus“ per la sent'.
Mi sentas ankaŭ: se mi „monus“,
Mi tre volonte „Vindobonus“,
Eĉ se modesta muta best'
Sidus ĉe Via granda fest'! ...
Nune Vi kredu: eĉ kuŝanta
En Varsovia mia lit',
Kun Vi mi estos — per Spirit',
Por bel-estonto Vin benanta,
Eĉ nevidebla dum festen'
Kuntrinkos vinon en Vien' ...

5.

Mi krios — ĉu trinkul'-diabl',
Ĉu bon-anĝelo en la kanto,
Ĉe Via tablo, aŭ sub tabl':
Vivu eterne Esperanto!

Varsovio, 31./5. 1936.

Leo Belmont
(Tradukinto pola de „Onegin“).

Saluton kaj Bondeziron al la 28-a Kongreso.

El la Montaro de Ned.-Hindujo.

Pere de julia „Aŭstria Esperantisto“ de pasinta jaro, la Aŭstria Registaro ĝentile invitis la tutmondan esperantistaron, ĉeesti la 28-an Univ. Kongreson de Esp., kiu okazos en la bela urbo ĉe Danubo. Ho, kiel volontege ĉiu esperantisto akceptus tiun ĉi afablan inviton! Nur vere nevenkeblaj cirkonstancoj povus motivi foreston. Ĉar ju pli da ĉeestantoj, des pli da sukceso! Nu, ni eĉ unu momenton ne dubas pri tiu sukceso. Ĉu en la lasta de ni ricevita numero, la marta, ne montriĝis, ke jam 512 personoj aliĝis el 28 landoj? Sendube en aŭgusto la nombro multobliĝos. Tiel la 8-an de aŭg. la iama Imperia Kastelo, la fiera „Burg“, malfermos siajn pordojn

al tre granda aro da vizitantoj el ĉiuj landoj de la mondo. En la brilaj, imponaj salonegoj ili salutos unu la alian, **ne** kiel aliaj de diversaj nacioj, **ne** kiel fremduloj, sed kiel **samideanoj.**

*

La utilecon de kongresoj neniu povas nei, ĉar ili ĉiam estas la centro, kie la interesatoj pritraktas komunan gravan laboron. Ĉi tie ni celas la kutimajn kongresojn, pri kiuj nur certa kategorio da personoj interesiĝas. Kompare kun tiaj kunvenoj, niaj Esperanto-kongresoj, **veraj Mondkongresoj**, estas multe pli signifaj: ili ja bonvenigas ĉiajn naciojn **ne** kiel Francojn, Belgojn, Anglojn ktp., sed kiel homojn, kunhomojn, fratojn kaj fratinojn, kvankam apartenantajn al plej malsamaj popoloj, tamen samsentanoj kaj samcelanoj. Ili estis trovintaj pli belan kaj multvaloran interkompreniĝilon, kiu forĵetis ĉiujn malfacilaĵojn, faligis ĉiujn lingvajn barojn. Dank' al tiu universala lingvo la kongresanoj sentas sin gefratoj, ili faras, almenaŭ unu semajnon, unu grandan rondon familian, laŭ la alta Zamenhofa idealo.

Dum la tagoj de la Kongreso la stratoj de la ĉarma metropolo pleniĝas je loĝantoj el ĉiuj landoj de la mondo. Ho, kia babilona lingva konfuzo naskiĝus, se ĉiuj uzus sian propran lingvon! Kia malbelsona bruo!

*

Kvankam la cirkonstancoj al ni malebligas persone ĉeesti, ni tamen kun tuta koro **enpense** partoprenos en la kongreso. La kongreso kun ĝiaj benoj pasos antaŭ niaj animaj okuloj. La 28-a meritas specialan atenton pro tio, ke en ĝi havos lokon la unua Konferenco de Virinoj.

Ni gardos la memoron pri la belega ĉirkaŭaĵo de la kongresejo. Tial vi sciu gefratoj, ke ankaŭ en la malproksima Ned.-Hinduja montaro bategas la koroj de veraj Esperantistoj dum okazas kongresaj paroladoj, kaj gajaj ekskursoj kaj festoj. Por pensoj al la bono ne ekzistas distanco!

*

Ni finas nian leteron per ripeto de la titola ekkrio: Saluton kaj bondeziron al la Kongreso! **Samideanino.**

Nia Lingvo.

Solena kanto, dedičita al la 28-a Universala Kongreso de Esperanto (Melodio: „Alfuegu, popolaroj!").

Tra la mondaj malproksimoj
Sonas voko pli kaj pli,
Muroj, baroj, landaj limoj
Ne ekzistas kontraŭ ĝi.
Ne la glavon ĝi admonas:
Amon, pacon en liber',
Ĝojon kaj felicon donas
Nia lingvo de l' esper'.

Voku, lingvo de l' espero,
Plu kaj plu de kor' al kor'!
Ni vin sekvas kun fiero,
Kun fidelo kaj fervor'.
Brilu, brilu, verda stelo,
Super landoj, super mar',
Kaj konduku al la celo
Nin tra nokto kaj nubar'!

Dio, helpu nin kaj donu,
Ke la revo iĝu ver'!
Kara lingvo, sonu, sonu
Ĉie, ĉie sur la ter'!
Verda stelo, kondukanto,
Radiegu pli kaj pli!
Vivu, vivu Esperanto,
En eterno vivu ĝi!

Karl Vanselow.

Dr. Wilhelm Róbin.

Kial ni amas nian majstron?

Parolado dum la Aŭstria Vespero, okazinta la 24. 4. 1936 en Varsovio.

Karaj Gesamideanoj!

Ĉu esperantistoj aranĝas aŭstrian, ĉu svedan, ĉu japanan vesperon, ĉiam ŝvebas super ni la spirito de l' kreinto de Esperanto, dr. L. Zamenhof, kaj liaj ordonoj.

Ĉar mirindan potencon ekposedis nia Majstro en la esperantistaro dum sia vivo kaj eĉ post foriro en pli bonan mondon.

Li regis ne sole niajn **mensojn**, nian intelekton, kiu komprenis, ke la Zamenhofa verko estas grandioza, neordinara fakto, — ke ĝi eble iam permesos kunligi en unu „rondon familian" diversajn naciojn, rasojn, konvinkojn —, Li regis ankaŭ niajn **korojn**, niajn sentojn.

Ni lin amegis, admiris. Kiamaniere konkeris niajn korojn homo modesta, ĉiam sin kaŝanta en angulo, homo posedanta influojn nek en la registaraj, nek en sociaj rondoj, kuracisto, ofte batalanta kun financaj mankoj, idealisto, fantaziulo, primokata de la aŭtoritatoj, gazetaro?

*

Mi devas esprimi en tiu loko mian konvinkon pri Esperanto. De la unua momento ni, malnovaj esperantistoj, estis frapotaj de ĝia simpla strukturo, logikeco, novaj kaj pravaj principaj reguloj. Ni konsideris Esperanton ideala solvo de la helplingva problemo, kiu tute ne devas timi konkurencon de aliaj provoj, antaŭaj kaj postaj. Ni estas konvinkitaj, ke Esperanto estas feliĉa, mirinde sukcesinta sintezo, ke ĝi estas verko de geniulo, simile al leĝo de Newton aŭ radio de Marconi.

Sed ĉu la mondo montris k o r a n rilaton al Newton aŭ Marconi? Ne, la mondo ilin kaj aliajn geniulojn admiris, donacis al ili honorajn titolojn, Nobel-premiojn ktp.

Kial do esperantistoj, disĵetitaj en la tuta mondo, esprimadis ĉiam tute alian, e l k o r a n s i m p a t i o n al nia Majstro?

Eble tial, ke li n e ricevis la Nobel-premion, ne riĉiĝis?

Mi kredas, ke ne tie ĉi kuŝas la kaŭzo. Tiom pli, ke Zamenhof ĝisvivis multajn honorojn, ordenojn, estis ne unufoje akceptita de reĝoj kaj regnestroj, mem vidis monumenton, starigitan al lia honoro (ekz. en Franzensbad), bone sciis pri multaj Zamenhofaj stratoj kaj placoj en diversaj landoj.

*

Permesu, karaj gesamideanoj. ke mi por unu momento deflankiĝu de la temo. En la historio de eltrovaĵoj ni ne malofte renkontas saĝajn sciencajn teoriojn, mirindajn inventojn, kies aŭtoroj, forgesitaj, mortadis en mizero. Okazas eĉ, ke post multaj jaroj la saman forĵetitan, primokitan, teorion aŭ eltrovon eltiradis iu alia, anoncadis sin ĝia aŭtoro kaj famiĝadis.

Kial? Ĉar n e s u f i ĉ a s i n v e n t i aŭ e k p e n s i n o v a n t e o r i o n, s e d n e c e s a s a n k o r a ŭ s c i p o v i ĝ i n p o p u l a r i g i, d i s v a s t i g i, k o n v i n k i p r i ĝ i a j v a l o r o j l a m o n d o n.

Iuj eble dirus, ke mankis al Esperanto reklamo, mankis gazetara propagando, prelegoj pri nova grava eltrovo.

Ne! Zamenhof v e n k i s ĝ u s t e t i a l k e l i n e u z a d i s r e k l a m o n, ne laŭdis mem sian verkon, n e faris bruon ĉirkaŭ sia persono.

Ĉar Zamenhof, la 100%-a idealisto, profunde konis la mondon, la realajn faktorojn, en ĝi regantajn. Tio savis la lingvon. Zamenhof bone antaŭvidis la homan envion, la eventualajn suspektojn pri lia ambicio, monamo, monemo, honoraspiroj ktp. Kaj Zamenhof d i s t r a n ĉ i s ĉ i u j n s u s p e k t o j n p e r u n u t r a n ĉ o.

Li senpage forsendadis el sia kabineto milojn da lingvaj konsiloj, li transdonis ĉiujn siajn personajn rajtojn al la esperantistaro („la lingvo estas posedaĵo de ĉiuj esperantistoj") — jam en 1893, t. e. 6 jarojn post apero de Esperanto, kiam troviĝis esperantistoj reformemaj, li mem aranĝis plebisciton kaj deklaris anticipe sian plenan obeon al ĝiaj decidoj, — fine en 1912, dum la Universala Kongreso en Kraków, kiam la esperanta movado sufiĉe maturiĝis, li faris la konatan deklaracion: „Ĝis nun mi estis antaŭ Vi, de nun mi estos inter Vi."

Ĝ u s t e d a n k' a l t i u j e c o j d e g r a n d a p r u d e n t o, m o d e s t o, t a k t r i l a t o a l ĉ i u j, d e m o k r a t e c o, — li akiris nian amon, niajn korojn.

Tio kaŭzis la grandan estimon kaj adoron ne nur de samideanoj, sed ankaŭ flanke de multaj potencaj spiritoj, kiel ekz. Max Müller, Leo Tolstoj, August Forel, Charles Richet k. a.

Tial al la teatra loĝio, kie sidis la Majstro, marŝadis vico da regnaj aŭtoritatoj, sciencaj kuloj, ĵurnalistoj. Tial en Cambridge oni renkontis Zamenhof-on kun preskaŭ reĝaj honoroj: en la stacidomo la skota gvardio ludis anglan kaj esperantan himnojn, la tuta urbo estis ornamita per esperantaj flagoj kaj la Universitata Senato atendis lin por oficiala akcepto.

Tiun miraklon jam en 1907, t. e. antaŭ 30 jaroj, povis okazigi nia Majstro ne dank' al la lingvo mem, kiu tiam estis ankoraŭ „muziko de l'estonteco", sed dank' al siaj personaj kvalitoj kaj al la ideo de Esperanto.

*

Ĝuste por tiu ideo la esperantista mondo kolektiĝas ĉiujare dum la Universalaj Kongresoj kaj kreas tie „Esperantujon", senpartian, apolitikan oazon, „paradizon sur la tero", daŭrantan, kiel ĉio bela, mallonge, nur 8 tagojn.

Tiujare la Esperantujo okazos en la simpatia urbo Vieno kaj en la pitoreska Aŭstrio — ni do havos „duoblan paradizon".

Kiu konas Vienon, tiu volonte refoje ĝin vizitos, — kiu ne konas, estas bedaŭrinda homo kaj li nepre profitu la nunjaran paradizon, por ke li poste ne ploru pri „paradizo perdita".

Daŭrigu la legadon de **Aŭstria Esperantisto** per abono, se ĝi plaĉas al vi.

Daŭriga abono ĝis fino 1936 svfr. 1.— (3 poŝtaj resp. kup.), por 1937 svfr. 3.75, kune 4.50.

Partoprenu en konkursoj:

a) proponoj pri plibonigo de la gazeto,
b) ensendo de manuskriptoj literaturaj (ĝis 3 kolonoj) kaj ĝenerale interesaj.

Kongresejo: La salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.

Leter-kaj telegramadreso: Esperanto, Wien, Hofburg.

Parolu **Esperanton dum la kongreso!** Estas bedaŭrinda signo dum ĉiuj internaciaj Esperantokongresoj, ke parto de la kongresanaro parolas en nacia lingvo. Ni petentigas la ŝatatajn gekongresanojn, ke ili en siaj patrolandoj havas sufiĉan okazon paroli nacilingve. Dum Esperantokongreso ni preferu la esperantan lingvon. Ekzercado perfektigas! Ni montru nian esperantismecon, parolante ĉiam Esperanton!

8. listo.

1. Vérot Francisque, instr-ino, St. Etienne, Francujo.
2. Vérot Victoire, instr-ino, edzino.
3. Vérot Euphrasie, studentino, filino.
4. Davier Odette, gimnastika prof-ino, Saint Etienne, Francujo.
5. Haberler Hans, librotenisto, Wieselburg.
6. Pirée G. A., Roosendaal.
7. Pirchan Paula, Waidhofen a. d. Thaya.
8. Reißmüller Elfriede, instr-ino, Waidhofen a. d. Thaya.
9. d-ro Turi Ramiro, Napoli.
10. Turi Elmo, f-ino, advokato, Napoli.
11. Moccagatta Vittoria, instr-ino, Torino.
12. Poitrey Luce, instr-ino, Oran, Alĝerio.
13. Mounier Marie Joséphine, inst-ino, Oran.
14. Wilhelmsen Kirsten Pedersen, ludilvendistino, Köbenhavn.
15. Lackenbacher Morico, spertulo de librotenado, Wien.
16. Rode Väino, lernanto, Tapa, Estonujo.
17. Jurnas Ida, farmaciistino, Pärnu, Est.
18. Miina Elli, farmaciistino, Tartu, Est.
19. Rüütli Velda, medicina studentino, Tartu.
20. Rüütli Alüde, farmaciistino, Tartu.
21. Sikkut Meeta, instr-ino, Võrumaa, Est.
22. Tihane Olga, frizistino, Tallinn.
23. Uus Gottfried, ofic., Tallinn.
24. Eik Margarete, ofic-ino, Tallinn.
25. Charlet J., f-ino, instr-ino, S. Bel, Franc.
26. Buri Raymond, instr., Villeurbanne.
27. Clavier Blanche, instr-ino, Caluire.
28. Berrod Yvonne, instr-ino, Villeurbanne.
29. Rossignol, s-ro, Lyon.
30. Bouchardet Jeanne, kalkulistino, Lyon.
31. Giraudot, s-ino, instr-ino, Oullins.
32. Giraudot Marie Thérèse, lernantino, Oullins.
33. Hansson Vega, Strömsbro, Svedujo.
34. Björnsjö Margit, Stockholm.
35. Persson Oscar, komercisto, Smedjebacken, Svedujo.
36. Turfors Einar, Mörbylanga, Svedujo.
37. Spangberg Emma Elisabet, kontoristino, Boras, Svedujo.
848. Gruneau Anna, sekretariino, Stockholm.
849. Kern Gottfried, Schillerstraße 20, Krems.
850. Tüchler Robert, episkopo de la malnovkatolika eklezio de Aŭstrio, XV., Geyschlägergasse, Wien.
851. Protiwinsky Josefine, ofic., Krems a. D.
852. de Cock Buning Willem, sekretario por Eŭropo de Intern. Auxiliary Language Association, Haag.
853. Mackay William Robert, mara inĝeniero, Ilford, Anglujo.
854. Redding Charles S., Carcroft, Doncaster.
855. Čížková Anna, lerneja direkt., Slaskov b. Brünn, Ĉeĥoslovakujo.
856. Wandl Leo, Ruprechtshofen.
857. Pirchan Karl Siegfried, Wien.
858. Lundh Nelly, Örebro, Svedujo.
859. Andersson Martha, Örebro.
860. Elg Carl Gunnar Gottfrid, pentristo, Grums, Svedujo.
861. Baur Arthur Leonard, studento, Zürich.
862. Pollenus Emile, Spalbeek, Belglando.
863. Höfert Franz, magistro, Znaim, ČSR.
864. Volard Guy, desegnisto, Nantes.
865. Bassani Mario, ing., Torino.
866. Offerhaus Aleida Gezina, Lochem, Ned.
867. Dekker Maartje Louise, instr-ino, Purmerend, Nederlando.
868. Seckel J. B., f-ino, instr-ino, Almelo.
869. d-ro Ardavazt, c/o Mr. O. Hamamci, Singer Sewing Machine Comp., Beyoglu, Turkujo.
870. Wiesbauer August, Bolzano, Italujo.
871. Wiesbauer s-ino, edzino, Bolzano.
872. Putto Tini, instr-ino, Arnhem, Ned.
873. Melich Valeria, stud., Kaposvár, Hung.
874. Felszeghy Maria, instr-ino, Kaposvár.
875. Zumpf Josefine, vendejestrino, Wien.
876. Weibel Erna, priv. ofic-ino, Wien.
877. Dick E., s-ro., Gent, Belglando.
878. Degand, s-ro, advokato, Dunkerque.
879. Watier René, oficisto, Amiens.
880. Rettel Yvonne, Nancy.
881. Öst Lisa, Uppsala, Svedujo.
882. Qvik Jenny, Uppsala.
883. d-ro Dattner Heinrich, konsilisto e. p. de la ŝtata fervojo, redaktoro, Kraków.
884. Bertig Hermine, Kraków.
885. Letfuhs Maria, Wien.
886. Gelin s-ro, instruisto, Arbresle, Francujo.
887. Michels Heinrich, Skodborg J., Danujo.
888. Hansen Anna Kaas, Svendborg, Danujo.
889. Rasmussen Esther, Svendborg.
890. Ulbert Franz, vic-urbestro de la kuracloko Karlsbad, ČSR.
891. ** Kuracloka direkcio, Teplitz-Schönau, ČSR.
892. ** Kuracloka direkcio, Franzensbad, ČSR.
893. ** Kuracloka direkcio, Marienbad, ČSR.
894. Vranckx Alice, Oude God, Belglando.
895. (Bl.) Schober Olga, Wien.
896. Connor George A., instruisto, New York City.
897. Wilflingseder Fanny, Riedau.
898. van Pernis Ds. M. A., predikisto, Doetinchem, Nederlando.
899. Strážnická Julie, Prostějov, ČSR.
900. Morris A. V., s-ino, Bar Harbor, Maine, Usono.
901. Koolschijn F., f-ino, Rijswijk-Z. H., Ned.
902. Dr. Allocchio Pietro, Milano.
903. Garnier Claire, Romans, Francujo.
904. Gaillard Germaine, Romans.
905. Márkus Gizela, Budapest II.
906. Putto A. J., f-ino, Arnhem, Nederlando.
907. Bakker Hans, instr., Amsterdam.
908. Sirk d-ro Hugo, prof., Wien.
909. Mirwald Luise, Schärding am Inn.
910. Kutscher Ludwik, Kraków.
911. Arrigo Bajetti D., pastro, Brescia.
912. Zollinger René, teknik-horloĝisto, La Chaux-de-Fonds.
913. Buenting Frederik Wilhelm, E.-instr., el Nederlanda Hindujo.
914. Gonella d-rino Angiola, dir. de mezlern. ŝtata instituto, Torino.
915. Rotter-Waschmann Bertie, s-ino, Jägerndorf.
916. Maksimović s-ro, Beograd.
917. Maksimović Dana, edz.
918. Bec s-ro, ŝtatofic., Nice.
919. Pietschmann Marie, instr-ino, Tetschen, ČSR.
920. Hallamayer Magda, s-ino, Graz.
921. Kasikova Františka, s-ino, M. Ostrava.
922. Hartman Aleksander, Waszawa.
923. Haudebine Madeleine, Če-instro-ino, Paris.
924. Táborsky Guszti, ofic-ino, Budapest.
925. Kelders r-ro, Den Burg, Nederl.
926. Thiessen s-ro, Den Burg.
927. Sapiro Jakob, journalisto, Bialystok.
928. Ferradini d-ro Ferruccio, ing., Milano.
929. Berndl Alois, Wien.
930. Bauböck Josef, flegisto, Salzburg.
931. Bauböck f-ino.
932. Bauböck f-ino.
933. Csonka Vitéz Kálmán, hung. reĝ. agrikultura ministra oficisto, Budapest.
934. Medrkiewicz d-ro Jan, Lublin.
935. April Helena, XXII., Kraków.
936. Weinsberg Regina, Kraków.
937. Stöckl Josefine, XVIII., Wien.
938. Blumental Leopold (Leo Belmont), verkisto, jurnalisto, Warszawa.
939. Rytenberg Eugenjusz, Warszawa.
940. Rytenberg Emilja, edzino.
941. Orosz Zofja, Warszawa.
942. Hermelin Emilja, Warszawa.
943. Klein d-ro Karol, Lwów.
944. Klein Natalja, edzino.
945. Zawada Jan, Warszawa.
946. Weinstein Halina, Warszawa.
947. Dawid Józef, Szopienice, Polujo.
948. de St. Jullien P., St. Laurent-Blangy.
949. Galbusera France, industriisto, Verona.
1007. Blomkvist Sonja, Stockholm.
1014. Paulsson Agda, Malmö.

Kooperativa Esperanto-Ligo.

Vizito al interesaĵoj de Aŭstriaj Kooperativaj Societoj estas aranĝota. Vidu la anoncon sur la tabulo en Kongresejo. Demandoj pri la KEL al J. F. Jackson (Kongres-No 310).

„La Blanka Ĉevaleto."

Kantludo en 3 aktoj (libere laŭ la komedio de Blumenthal kaj Kadelburg) de Hans Müller, muziko de Ralph Benatzky, trad. en E-o de Hovorka kaj Norbert.

Tekstoj de la kantoj de Robert Gilbert. Muzikaj enmetaĵoj de Robert Gilbert, Bruno Granichstaedten, Robert Stolz.

Aktoroj:

Josepha Voglhuber . . .	Annie Sieburg
Leopold Brandmayer . .	Ernst Duschy
Wilhelm Giesecke . . .	Marcel Bénard
Ottilie	Lotte Berg
Dr. Erich Siedler . . .	Robert Pless
Siegismund Sülzheimer .	Heinrich Gaßner
Prof. Dr. Hinzelmann . .	Ernst Rollé
Klärchen	Hedy Straas
La imperiestro	Dr. Paul Gerhardt
Pikkolo	Anny Krenek
Kathi	Mia Kainz

Muzika gvidado: Bruno Zilzer.

Enscenado: Ernst Rollé.

Dancoj: Thomas Peter.

Universal Edition A. G.
Wien, I., Karlsplatz 6.
La gvidaj eldonaĵoj de klasika kaj moderna muziko, modernigoj, partituroj en poŝformato, pruntmaterialo por orkestroj, vendo de teatroverkoj.

Komerca ĝeneral-reprezentanto, aĉetisto de eksterlandaj firmoj (eksporto & importo) serĉas rilatojn kun gravaj firmoj. Korespondas germane, angle, france kaj Esperante. — Referencoj je dispono.

A. Fischer, Wien, Porzellangasse 13.

Baghy kaj Kalocsay.

En ĉi tiu aŭtuno pasos dudekkvin jaroj, de kiam la du plej grandaj poetoj de nia literaturo: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, ekkomencis sian laboron por Esperanto.

Interese koincidas kelkaj gravaj datoj en la vivo de niaj du gvidantaj poetoj: ili naskiĝis en la sama jaro, 1891, ili esperantistiĝis en la sama jaro 1911, ili same estas hungaroj kaj same en Budapest ili grupigas ĉirkaŭ si la modernan skolon de la esperanta literaturo. Ludo de la hazardo! Esence kiom da diferencoj koncerne verkistan profilon, laborsferon, legantar-tavolon ... Sed malgraŭ la diferencoj, kun kia egale hela lumo brilas sur la firmamento de nia lingvo tiu ĉi ĝemela steloparo, kies malsamspeca radiado ne malhelpas, eĉ fortigas la brilon unu de la alia kaj sorĉas antaŭ niaj okuloj tian dibocan fajroludadon, ke apenaŭ ni kapablas malfermi la okulojn tiel kutimiĝantajn al la modestaj meĉoj de nia malriĉa ĉielo ...

En la siberiaj militkaptitejoj komenciĝis la eksterordinara esperantista kariero de **Julio Baghy**: tie li gvidis kursojn por diversnacianoj, tie vundiĝis por ĉiam lia sentema, justo-serĉanta animo pro la teruraĵoj de la bestiĝanta homo, tie formiĝis en li lia filozofio, kiun li volis fari savilo ĝuste kontraŭ tiu bestiĝo, kaj tie li travivis kun elementa forto la internan ideon, tiun ĉi ĉefmotoron de ĉia Baghy-a verkado kaj ago ... Poste li revenis al la patrujo kaj intence partoprenis en la postmilita movado, gvidis kursojn, formis grupon, aranĝis literaturajn vesperojn ktp. Kaj venis la internacia laborkampo: universalaj kongresoj, kiujn li partoprenis aktive kaj al kies spirita nivelo li signife kontribuis, kaj la rond-instruado Csehmetoda, dum kiu li pruviĝis unu el niaj plej talentaj instruistoj; instruisto, kiu ne kontentiĝas per la strikta prezento de la lernomaterialo; instruisto, kiun neniaj formuloj kapablas kateni; instruisto, kies disĉiploj ne forlasas la movadon, sed restas fidelaj eĉ post jaroj, ĉar vivas en iliaj koroj kun flagranta flamo la sankta fajro, kiun ekbruligis ilia instruanto.

El ĉi tiu tre multflanka laboro rezultis, ke Baghy atingis ĉion atingeblan, kion tre malmultaj verkistoj atingas jam en sia vivo: li estas la plej populara homo en nia movado kaj liaj portretoj pendas tiom ofte en la klubejoj, kiom ofte nur tiuj de Zamenhof kaj pastro Cseh, kaj samtempe li atingis la plej altan oficialan rekonon, fariĝinte jam antaŭ jaroj membro de la Esperantista Akademio.

Se mi petus min, ke mi koncize klarigu al li kio ja estas tiu Baghy-a filozofio, pri kiu oni povas legi tie kaj ĉi tie, en recenzoj, studoj, foje por, foje kontraŭ: ja mi ne povus alie respondi: la interna ideo. Jes ja, ĝi estas la esenca trajto de la homa kaj verkista sintenoj de Baghy, ĝin li glorigas per sia poresperanta agado, ĝin li enportigas pere de siaj verkoj, kiuj humile, sed konscie portas sur si la devizon: „AMO KREAS PACON, PACO KONSERVAS HOMECON, HOMECO ESTAS PLEJ ALTA IDEALISMO.“ Jes ja, tiu ĉi filozofio eble ŝajnas tro idealista, tro malfirmbaza, por nia sange reala epoko, ja aŭdiĝis voĉoj kritikaj, kiuj esprimis sian dubon pri la aktualeco de tia filozofio, sed ni konfesu sincere, ĉu la Baghya filozofio kulpas? Aŭ eble la epoko?! Kaj ĉu ne ĝuste tia simpla elementa kredo, tia mondrigardo iom naiva, (ni ne timu la vorton; trafulmas mian kapon la naiveco de Sankta Johana en la Shaw teatraĵo). Estas eble tio, kio pleje mankas al nia generacio, tiel blinde rapidanta al la abismo?

La granda literaturhistoria signifo de la Baghy-verkaro konsistas en tio, ke per sia ekzisto ĝi pruvis la kapablecon de Esperanto por originala literaturo. Jes, estis ja antaŭ lia apero originalaj romanoj kaj originalaj versoj kaj estis unuopaj esperantistoj, kiuj ilin legis, kelkaj poemoj de Zamenhof kaj Grabowski iĝis jam komunaj trezoroj de la esperantistaro, sed Baghy unue kapablis krei ĉirkaŭ si legantan publikon, jam ne plu unuopulon, sed publikon en la vera senco de la vorto, legantojn, kiuj ne nur legas la librojn, sed parolas pri ĝi, komentas ĝin; jes, Baghy alportis la novaĵon: la apero de E.-libro estas socia evento. Kaj li faris ankoraŭ plian miraklon: versoj ĝenerale ne estas vaste popularaj, krom la Zamenhof-poemoj, kiuj ja iĝis por la esperantistaro pli ol simplaj poemoj, akirinte la rangon kaj rolon de religiaj himnoj. Sed krom ili kaj eble kelkaj versoj de aliaj aŭtoroj, la esperantlingvaj poemoj ne vekis laŭtan resonadon. Nun venis la Baghy-poemoj kaj ilia dolĉa muziko, ilia facilsalta ritmado, ilia fortmuskola impeto enfrapis sin en la orelojn kaj korojn de la esperanta publiko. De tiam la E.-verso estas afero ne nur de la poetoj kaj recenzantoj.

Ankaŭ kiel satira prozisto li estas vojrompanto sur tiu ĉi kampo, li verkis lirajn ĉapitrojn en sia granda romano **Hura** kaj precipe estas mia korinfano la ruze mallerta, ĉarma figuro de Mihok, heroo de bonegaj Baghy-noveloj, kiu estas aparte sukcesa vivanta kreaĵo de Baghy, kvazaŭ vivanta persono el nia malgranda E.-mondo.

Nepridiskuteblaj estas la meritoj de Baghy ĉirkaŭ la antaŭpreparo de la venonta esperanta dramo. Li mem verkis teatraĵojn; en ili kaj en tiuj de aliaj aŭtoroj li aktoris kun granda sukceso; kaj kiel reĝisoro li faris miraklojn: el kelkaj bonvolaj, inteligentaj sed neniel fakspertaj amatoroj li ellogis tiel brilajn prezentadojn, ke, trankvile ni povas diri, li atingis la maksimumon, kion oni povas atingi. Kaj li semis grajnon, kiun la estonto rikoltos ...

*

D-ro med. ĉefkuracisto en hospitalo por infektaj malsanuloj, docento ĉe la budapeŝta Universitato, post la milito aktiva partoprenanto en la E.-movado, gvidinto de kursoj, ĉefredaktoro de Literaturo Mondo en ambaŭ periodoj ĝis nun, verkanto de sin sekve aperantaj libroj; jen la eksteraj datoj el la vivo de tiu granda esperantisto kaj granda homo, kiun ni konas sub la nomo de Kolomano Kalocsay.

Per verstradukoj li komencis sian nomon tuj venas en la kapon memorbildo pri iu el liaj majstraj traduklibroj. Kaj vere, la Kalocsay-tradukoj surhavas ian individue karakterizan stampon, kiu ne nur mankis en ĉia tradukaĵo, aperinta antaŭ li, sed kiu levas liajn tradukojn alte super la ĝistiama akiraĵon de la E.-literaturo. Kio estas la sekreto de liaj tradukoj? Bonajn tradukojn ni ja trovas antaŭ li, sed la ĉefa kaj plejparte la sola gajnaĵo de tiuj tradukoj estis la formo **solvo.** La lingvo ankoraŭ ne estis ellaborita kaj la tuta energio de la tradukanto elĉerpiĝis en la serĉo de forma solvo, por io pli ne plu restis forto. La esenca supereco de Kalocsay kuŝas tie, ke la perfektecon de la formo li levis tiel alten, ke la forma solvo por li ne plu estas problemo, do li havas energion por transplanti ankaŭ la humoron, individuan guston de la tradukota verko kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, koloroj. Jes, Kalocsay estas kreanta ĝardenisto, kion li transplantas tio enradikiĝas en la E.-humo kaj ekfloras je mirinda nova vivo, kelkfoje la nova vivo radias pli riĉan brilon ol la originalo. Vivanta voĉo parolas el tiuj ĉi libroj, nenie aŭdiĝas la raŭka knarsono de artefariteco, nenie tramalsokiĝas postsignoj de ŝvitado en laboro. Tre simpla estas la sekreto de tiu ĉi nova tradukarto. En la tradukita E.-verso la lingvo la unuan fojon ĉi tie vekiĝis je vivo. Tia eksterordinara rezulto ne povis resti sen vastefikaj sekvaĵoj. Kalocsay ne apartenas al la tipo de memcentra memrigardanta artisto, kiu eble naskas artverkojn, sed de kiu neniu povas lerni ion; ne, Kalocsay donis ne nur ekzemplon, li faris pli: li konsciigis en si mem sian labormetodon kaj cedis ĝin al komuna trezoro. Tio klarigas, ke lia tradukarto portis kun si ĝeneralan ekfloron de la Esperanta verstraduko: de tago al tago aperas novaj junaj talentoj, eldoniĝas Antologioj, kiuj en inda kvanto kaj artnivelo prezentas la poezion de iu nacia literaturo. Kaj ĉio ĉi ne estis imagebla antaŭ la eklaboro de tiu ĉi perfekta artisto kaj edukanto.

La signifo de la originala poezio de Kalocsay kuŝas en tio, ke ĝi unue levis la E.-poemon egalranga al iu de la elitaj naciaj literaturoj. Unue ni sentis, ke la modesta rivereto de la E.-poezio kontaktiĝis kun la giganta fluo de la eŭropa liriko. Komence de la plej sekrete delikataj animvibradoj, de la plej embuskaj subkonsciaĵoj de la plej veluraj humornuancoj, de la plej petoleme ĉarmaj amoludoj ĝis la tragika malheliĝo de mondproblemoj, ĝis la katastrofa kaosiĝo de individuaj kaj kolektivaj sortoj, ĝis la fine tamen

nkespera volo de la homo de l' estonto: problemoj, centoj, humoroj de moderna mo, kiuj en Esperanto unue eklaŭtis sur bronzo sonanta de Kalocsay!

Erarus tiu, kiu pensus, ke la lingvisto as ia aparta homo en Kalocsay. Ke la eto kaj scienculo estas apartaj personoj. lia okupiĝo pri la lingvista flanko de la vado estas nur alproksimiĝo al la sama o, el alia flanko. La celo; vivigo de la gvo kaj ĝia evoluigo al tia nivelo, ke ĝi u kapabla esprimi ĉion, kion homa cerbo koro diktas, jes, li celas fari la lingvon a ilo por la homaro, strebanta alten. Li onis, ke por fari altnivelan literaturon, ne ĉas la dekses regulojn kaj la trunka taro de la fundamento: estas bezonataj ncoj kaj en la vortoj (neologismoj) kaj la sintakso. Humile kaj kun fera volo li jetis al studado de la ekzistanta lingvoterialo, ĉefe al la verkoj de Zamenhof kaj ezulton de sia laborego li transdonas al en la Plena Gramatiko kaj en siaj lingvinaj artikoloj. Kaj al la leganto malkovriĝis nova mondo: neniam ankoraŭ aperis al Esperanto en formo tiel muskola, tiel oŝvela, kiel en la verkoj de la plej genia kovranto de ĝiaj leĝoj.

La redaktora seĝo portis al Kalocsay mulan laboron, sed lia redaktoreco portis al E-literaturo multegan benon. Lia bonvola iziado, liaj ĉiam modeste prezentitaj vaegaj konsiloj, helpis al multaj talentaj ideanoj; lia pasio al malkovro de novaj ntoj konatigis multajn novulojn al la liko, lia fantazio riĉa je ideoj, lia nelabla instigemo al laboro jam naskigis tajn librojn, artikolojn ... Kaj certe oni rimarkis, ke Kalocsay havas ian propran ieron de korektado: ankaŭ sur tiu ĉi po li sekvas la principon de neceso kaj o, nome li korektas nur la nepre neajn, sed lasas valida la individuan stilon la korektito.

Multaj imagas Kalocsay kiel nuran literaiston, kiun la movada parto de Esperanto multe interesas. Eraro! La movado interes lin same, kiel la literaturo. Li rekonis, Esperanto nur helpe de sia literaturo as ĝisatendi sian ĝeneraliĝon, ke la unto de la lingvo baziĝas sur sia literao, tial li akcentas ĝian gravecon. Por li literaturo ne estas io memcela, kiel ankaŭ lingvo ne estas memcela: en lia mondcepto ambaŭ servas la venontan pli perfan homon.

Ni deziru al niaj jubileantoj, ke la fruktonajn dudekkvin jarojn sekvu ankoraŭ taj-multaj jaroj plenaj de sano kaj sukca laboro.

L. Totsche.

Julio Baghy kaj **Kolomano Kalocsay** festos la 25-jaran **Esperanto-jubileon** de sia espetistiĝo.

La komitato por „Baghy-Kalocsay-jubileo" niĝos en la kadro de nunjara **Hungarlanda Kongreso** la 15. de aŭg. dum la tagoj **Postkongreso** (15.—18. aŭg.) feston, al ĉiu amiko de ambaŭ estas kore invitata.

Je tiu okazo ankaŭ aperos

Jubilea Albumo,

konata de la aranĝanta komitato kun kulteroj sendotaj je tiu okazo. Informojn d-ro Fr. Szilágyi, Budapest, VII., Peterdy-a 38.

Antaŭ 25 jaroj, en septembro 1911, esperantiĝis kort. kons. **Hugo Steiner**, Wien. Instruis lin Julius Glück.

D-ro L. L. Zamenhof pri neologismoj.

(Daŭrigo.)

d) La kvara kategorio prezentas reformojn, kiuj per si mem eble efektive prezentus kelkan plibonigon, sed kies valoro estas tiel malgrandega, ke ili certe ne meritas, ke pro ili oni faru ian ŝanĝon en la lingvo. Sekve ankaŭ pri tiu ĉi kategorio da reformoj ni povas tute ne paroli.

e) Tiamaniere restas nur unu tre malgranda kvina kategorio da reformoj, kiuj prezentas plibonigon ne sole efektivan kaj senduban, sed ankaŭ sufiĉe gravan por la praktika uzado de la lingvo kaj kiuj sekve devas esti enkondukataj en la lingvon. Sed la nombro de tiuj ĉi efektive reformindaj vortoj kaj formoj estas tre malgranda. Kion do ni devas fari kun ili? Ĉu ni devas fari en la lingvo certan nombron da ŝanĝoj?

Ne, absolute ne! Ĉar Esperanto estas tiel konstruita, ke ne sole ĉiu vorto, sed ankaŭ ĉiu gramatika formo prezentas nur ereton de la vortaro, tial ni bezonas nur krei kelkan nombron da novaj vortoj, kiuj ne faros eĉ la plej malgrandan tuŝon en nia Fundamento, ĉar ili ne anstataŭos la maloportunajn novajn vortojn, sed ekzistos nur paralele kun ili, kiel sinonimoj, kiuj ekzistas ja en granda nombro en ĉiu lingvo, — kiel neologismoj, kiuj kredeble iom post iom elpuŝos la malnovajn formojn kaj faros el ili arĥaismojn, tamen neniam nuligos, neniam senvalorigos ilin. En ĉiuj estontaj lernolibroj kaj vortaroj de nia lingvo kaj en ĉiuj novaj eldonoj de la ĝis nun jam verkitaj lernolibroj kaj vortaroj la novaj vortoj kaj formoj estos presataj ne anstataŭ la malnovaj, sed nur krom la malnovaj, samtempe kun la malnovaj (aŭ tabelo de la novaj vortoj kaj formoj estos simple aldonata al la libroj en formo de aparta folieto). La novaj vortoj estos aldonitaj al la Fundamento, kaj la estontaj esperantistoj krom la novaj formoj lernos ankaŭ la malnovajn, kiuj eĉ ne estos por ili superfluaj, ĉar ili povos de tempo al tempo uzadi ankaŭ ilin (kiam ili volos uzi stilon iom „antikvan", aŭ kiam ili volos pli akcenti la vortojn; ekzemple: „mi as (= estas) nevidata, sed mi tie ĉi estas."

Sekve la estontaj uzantoj de Esperanto havas nenian novan ŝarĝon, ĉar kiu ellernis kelkajn milojn da vortoj de nia lingvo, tiu ja certe ne plendos, se li devos lerni ankoraŭ kelkajn dekojn aŭ eĉ kelkajn centojn da vortoj; en la lingvo estos farita nenia ŝanĝo aŭ rompo; neniu el la jam eldonitaj verkoj perdos sian valoron k. t. p. Kaj tamen kian grandegan gajnon ni havos! Dank' al la malmultaj novaj vortoj kaj formoj nia lingvo fariĝos multe pli eleganta, oportuna kaj flua, ĉar la malnovaj vortoj estos ja ĝuste tiuj, kiuj estas uzataj la plej ofte kaj per sia maloportuneco aŭ longeco faras la paroladon Esperantan neoportuna kaj lama.

La enkonduko de certa nombro da neologismoj donos al ni ankoraŭ la sekvantan gravan gajnon: ĝis nun diversaj malkontentuloj diradis, ke la praktika uzado montris en Esperanto diversajn gravajn malbonaĵojn, kiujn la esperantistoj, timante disfalon, nun jam ne povas forigi, kaj tial la malkontentuloj „estas devigataj krei novajn lingvojn"; la ŝanĝo de kelkaj formoj per vojo de neologismoj montros al la mondo, ke Esperanto, timante nenian disfalon, povas tre facile forigi tiujn punktojn, kiuj montriĝis efektive malbonaj. Tial, se Esperanto eĉ estus absolute perfekta, ni devus intence fari en ĝi kelkajn ŝanĝojn, por fari savantan oferdonon al la dio de malpaco kaj fermi la buŝon al la kriantoj, al kiuj ni povos nun ĉiam respondi: „se vi certigas, ke Via kritiko estas ne Via persona kaprico, sed efektive ‚tre grava malbonaĵo', pri kiu ‚la tuta mondo konsentas', tiam Vi povas ja prezenti Vian proponon al la Lingva Komitato, kiu enkondukos Vian proponon per vojo de neologismoj."

La frazo, ke „tio aŭ alia ne povas esti enkondukita per neologismoj, sed postulas reformon rompan", estus ne vera, ĉar per la sendanĝera vojo de neologismoj ni povas enkonduki ĉion, eĉ en tia okazo, se ĝi postulus ŝanĝon de la formoj jam ekzistantaj; la diferenco estas nur tiu, ke plibonigojn de la lasta kategorio ni devas fari ne per unu fojo, sed per du fojoj. Ekzemploj: 1. Imagu al Vi, ke la Lingva Komitato venis al la konvinko, ke la ĝisnuna „g" nepre devas esti elparolata kiel „ĝi" (kiel opinias kelkaj esperantistoj, kvankam mia opinio estas tute alia); kiel tiam agi? Decidi per unu fojo, ke „g" povas esti elparolata „ĝ" oni ne povas, ĉar tio ĉi donus kolizion kun la formo jam ekzistanta kaj sekve enportus konfuzon en la lingvon. Sed tiam oni povus agi en la sekvanta maniero: oni unue liberigus la literon „g", decidante, ke oni ĝin povas skribi ankaŭ per la vakanta kaj senkolizia „q", kaj post kelka serio da jaroj, kiam la „g" jam estos malaperinta el ĉiuj verkoj Esperantaj kaj forgesita, oni decidos, ke la nun vakanta kaj nenian kolizion donanta „g" devas esti elparolata kiel „ĝ". 2. Imagu al Vi, ke montriĝis necesa (?), ke la multenombro de substantivoj finiĝu per „i" anstataŭ „oj"; tiam oni agas en la sekvanta maniero: unue oni liberigas la „i" de la infinitivo, decidante, ke la infinitivo povas finiĝi ankaŭ per „ar"; kiam la „i" de la infinitivo estos jam forgesita, tiam oni enkondukos ĝin por la multenombro. (Daŭrigota.)

Por Tokio, kiel urbo de l' sekvanta Olimpiado!

Alvoko de Japana Esperanto-Instituto.

Ni urĝe petas helpon de l' eŭropaj samideanoj, kio certe faros gravan servon por nia movado.

Tre baldaŭ oni konsiliĝos en Berlino por decidi la lokon, kie okazos la 12-a Olimpiado, 1940. Kaj ĝin volas inviti Helsinki, Romo kaj Tokio. Krome oni informas, ke ankaŭ Londono prezentas sin kiel Kandidaton.

Kiun lokon oni elektos, tio ŝajnas tute senrilata al nia afero. Sed ni atentigas, ke la invito de Tokio havas specialan signifon, kio certe interesas ankaŭ la esperantistojn.

Jam ne bezonus mencii, ke Olimpiado estas unu el la plej evidentaj internaciaj aferoj, kiel nia movado. Sed ni devas ĉi-tie tion akcenti, ĉar ĝi nun staras ĉe la grava momento. Al ni, japanoj ŝajnas, ke nemalmultaj eŭropaj

landoj miskomprenas, kvazaŭ Olimpiado estas nur eŭrop-amerika afero.

Laŭ la raportoj de Tokiaj ĵurnaloj, ke en eŭropaj landoj oni ilustras, ke Tokio estas tre malproksima, kaj sekve — per tiu motivo — aŭ pretekste oni intencas ne akcepti la inviton de Tokio.

Jes, vere Tokio estas malproksima de Eŭropo. Sed pripensu; tio signifas, ke Eŭropo estas malproksima de Tokio. Sed malgraŭ tio Tokio — japanujo sendis jam 11 fojojn siajn sportistojn al tiuj malproksimaj eŭropaj kaj usonaj urboj! Ankaŭ en la nuna jaro ĝi sendis korpuson da junuloj. Por tio la japana parlamento aprobis subvencion de ne malgrava sumo.

Unu Japanujo iras 11-foje al Eŭropo aŭ Usono. Kaj la eŭropaj landoj ne povas — aŭ ne volas sendi al Tokio eĉ unu fojon! Kion tio signifas?

Tokio havas specialan aspiron inviti la 12-an, ĉar 1940 Japanujo festos grandan jubileon — la 2600a jaro de la fondo de la imperio. Se oni perdos la ŝancon la japanoj devas atendi ankoraŭ jarcenton! Tuta Japanujo — ĝia registaro, la magistrato, urbanoj de Tokio, kaj tuta popolo aspiras!

•

Agante en la senco de l' supra alvoko ni tuj skribis konforme al la Prezidanto de l' Aŭstria komitato por Olimpiaj Ludoj en Wien, sinj. kom. kon. d-ro Theodor Schmidt, petante pri subteno de Tokio flanke de Aŭstriaj delegitoj.

IXa Jugoslava Esperanto-Kongreso en Ljubljana.

La 30an de majo okazis en Ljubljana la IXa Jugoslava E-kongreso, kiu estis tre bela kaj sukcesplena. Partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj.

La stacidomo, bele ornamita per verdaj kaj naciaj flagoj, aspektis tre solene. La tuta urbo faris vere festan impreson: ĉiuj tramoj estis ornamitaj per naciaj kaj verdstelaj flagetoj kaj supre, kie oni alitempe vidas la numerojn, oni povis vidi la verdan stelon, kiu vespere estis lumigita. De sur la kastelo oni rigardis grandlitere „Bonvenon" kaj de la kastela turo brilis la verda stelo: amba estis vesp lumigitaj. Vespere je la 20. h komenciĝis E-akademio en Kazino, transsendata per ra La programo estis tre interesa kaj daŭris la 22. h; poste estis dancado.

La sekvintan tagon, dimanĉe, estis u Diservo en la monahina preĝejo kaj lia mo pastro Teofil Veluic el Dubrovnik predikis E belajn kaj impresajn vortojn. Poste en salono de Filharmonio okazis la solena m fermo de la Kongreso. Post la nacia him ludita de orkestro, parolis la ban (provincestro) kaj la urbestro de Ljubl Laŭvice sekvis la salutvortoj de LKK-estr La orkestro ekludis la E-himnon kaj sekvis la salutparoladoj de la delegitoj e diversaj landoj kaj urboj. En la nomo aŭstriaj esp-istoj parolis sam. Komposch Klagenfurt kelkajn salut-vortojn. Ankaŭ ti malfermo de la kongreso estis dissendita radio.

Tagmeze la festo estis finita kaj nun bed rinde pluvis. La kongresanoj estis kom fotografitaj, la programa ekskurso ne po

La „Viena Kafejo".

De Franz Vasta, Wien.

Vienano ŝatas ne nur vinon, virinon kaj kanton, sed krom tio ankaŭ—la kafon. Tutrajte oni povas nomi Vienon la urbo de la kafejoj. Antaŭ tri jaroj, la Viena kafejo povis registri sian 250-jaran ekzistadon.

Estas la merito de l'ukrajn-ano Georgo Francisko Kolschitzky (elp. kolsicki), ke li fariĝis la prapatro de Vienaj kafejestroj kaj pioniro en la disvastiĝo de l'kafo. Pro sukcesinta spiona servo favore al la defendantoj de Vieno, sieĝata de la turkoj en 1683, li post forpelo de l'malamiko rekompence ricevis el la postrestinta abunda trofearo 300 sakojn da kafo kaj de la urba magistrato domon en Wien en Haid-strato kun koncesio, fondi kafejon. La unua kafejo estiĝis en „Kleine Schulerstraße" en la t. n. „Kleiner Bischofshof" (nun Domgasse 6) kaj nomiĝis „Beim rothen Kreutz" (ĉe la ruĝa kruco).

Kolschitzky pretigis la kafon, kiel li estis tion vidinta ĉe la turkoj. La rostitaj kafo-fruktoj estis erigataj en pistujo kaj poste kuirataj. La trinkaĵon unuatempe oni prezentis al la gastoj en etaj argilaj tasoj, kun la pistaĵ-sedimento, sed sen sukero. Kvankam la nombro de la gastoj pro scivolemo kreskis ĉiutage, tamen la maldolĉa trinkaĵo ne volis tre bongusti al la Vienanoj. Tial Kolschitzky pensis pri plibonigo. Li forigis la pistaĵon kaj aldonis unue siropon, kaj pli poste kan-sukeron. Sed nur, kiam nia unua kafejmastro estis decidiĝinta, aldoni al la kafo ankaŭ lakton, la trinkaĵo vere bongustis al la vizitantoj.

Kafo kaj lakto estis metataj sur tablon en ventro-formaj latun-kruĉoj; la gasto miksis laŭ sia bontrovo. El granda latuna sukerujo, kiu sufiĉis por 100 porcioj, li prenis sian pecon da kan-sukero. Ĉiu kafej-vizitanto ricevis du lun-formajn bakaĵojn (Vienane „Kipferl"). Kafo kun lakto kaj du bakaĵoj kostis tiam kvar krejcerojn. Por la malriĉuloj en la tiama tempo ankaŭ tio estis jam luksо. Akvon post la kafo oni tiam ne trinkis, ĉar ĝi estis tro malbona kaj eĉ sanendanĝeriga.

Post la kafo-konsumo la kelnero alportis por la gasto „kolonjan pipon" kun longa tubo kaj ekbruligis servoprete la tabakon. Estis tiam ankaŭ la kutimo, ke la kafejestro prezentu al siaj gastoj p i n ĉ p r e n o n el sia bela tabakujo. Jam en tiu tempo la kafejo fariĝis la loko, kie oni povis informiĝi pri novaĵoj el la tuta mondo. Sed la kafejo restis rezervita, kiel la plejmulto de la tiamaj publikaj institucioj, ekskluzive al la viroj. —

Post la morto de Kolschitzky (19. II. 1692) la kafejon heredis liaj posteuloj, kiuj instalis en la domo Nr. 586 (nun Praterstrasse 2) en Leopoldstadt, novan kafejon, kiu ankaŭ baldaŭ bonfamiĝis. Iom post iom la Vienanoj alkutimiĝis al la kafokonsumado kaj la kafeja negoco trovis multajn

La unua kafejo en Wien: Mezepoka, malhela ejo, en kies fundo estas granda fajrujo. Kolschitzky, laŭ turka maniero vestita, babilas kun siaj gastoj kaj Ursula, lia brava edzino, helpas lin en la servado.

adeptojn. En la jaro 1700 ekzistis en Vieno nur kvar, en 1747 jam dekunu, en 1780 dekses kafejoj. Ĉirkaŭ la jaro 1800 estiĝis la tri kafejoj en la tiama nobelula „Prater".

Kia longa vojo depost tiam ĝis la nuna abundo je kafejoj ĉiuspecaj! Inter ili ekzistis kelkaj, kiujn oni ne povas forpensi el la evoluo de nia urbo. — Specialaĵo estis en Bäckerstrasse Nr. 3 la

Kafejo „Schmauswaberl" (frandemulino); imperiestrino Maria Theresia (1740—1780) dekretis, ke la restintaj bakaĵoj el la kortega kuirejo estu malmultekoste disponigataj al tiu-ĉi kafejo; estas do nemirinde, ke tie kunvenadis aro da frandemuloj, laŭ kiuj la kafejo ricevis sian trafan nomon.

Kafejo Kramer ĉe angulo de Goldschmie gasse, estis la unua, kiu disponigis al gastoj ankaŭ gazetojn: „Wiener Diariu kaj kelkaj Munhenaj kaj Berlinaj. La form-servo estis ja tremalvigla, ĉar ĝi bazi sur la leterpoŝto, ekspedata de po veturistoj. — En 1820, je angulo de Ne Markt estiĝis **Silbernes Cafehaus** (arĝen kafejo), kiu estis por la tiama tempo lukse adaptita; la kafo-subtasoj kaj vestaĵ-hokoj estis arĝentumitaj, la ka oni prezentis en belaj porcelan-tasoj, ĉe muroj estis altaj speguloj kaj s t a r i por longtubaj pipoj, eĉ bonkvalita bila ne mankis. Famaj gastoj vizitis tiun-ĉi ejon: Jarolinsky, Deinhardstein, Caste Lanner, Strauss, Schuster, Raimund, Fra Grillparzer, Anastasius Grün, Adalbe Stifter, Bäuerle kaj Schreyvogel. —

Je angulo de Schauflergasse esti 1847 **Kafejo Gr ensteidl.** Tie renko iĝis ĉiuj progresemaj personoj k moĸemuloj donis al ĝi la nomon „C Grössenwahn" (kafejo „al grandu frenezo"). Ĉar la malnova Burg-teatr troviĝis tute proksime, la aktoroj ku venadis regule en „Griensteidl". Pos la kafejo fariĝis koncentriga punkto de nova poeta generacio sub gvidad de Hermann Bahr, Arthur Schnitzle kaj Hugo von Hofmannsthal. Ankaŭ Viktor Adler kaj liaj amikoj estis ofte gastoj.

Kafejo Central en Herrengasse, Leo Trotzki estis regula gasto, kiam en Vieno vivis kiel rusa elmigranto. **Kafejo „Daun"** sur Kohlmarkt sen sin hejmece la politikistoj, kaj **Kafej Seidl** en Neulerchenfeld estis konata p siaj „ĉifonul-balfestoj", kiujn oni tie aran ĉirkaŭ 1860. —

Dum pli ol 250 jaroj la Viena kafe fariĝis institucio, kiu havigis al nia urb bonfamon tra la tuta mondo kaj kiu trov imiton eĉ en Ameriko. Ĉiuj proks. **800 kafejoj,** kiuj nuntempe ekzistas **Vieno,** havas komune la delikatan „Melange (kafon kun lakto), la bongustajn bakaĵo abundan provizon je gazetoj kaj ĵurnal atentemajn, spertajn kelnerojn, do ti atmosferon de komforto kaj agrablo, ki en tiel harmonia kombino ni povas tro nur en nia kara Vieno.

azi kaj la diversaj kafejoj baldaŭ estis enigitaj de babilantaj samideanoj.

La sekvintan tagon la samideanoj vizitis cian Galerion, Foiron aŭ danc-kafejojn. ntage, je la 20 h venis la ĉefparto de la tuta ongreso, la prezentado de la teatraĵo ervisto Jernej kaj lia rajto", dramo kun horo umbildoj de Cankar, tradukita de prof. odrijan. Kvankam ludis nur diletantoj, oni vis la impreson, ke veraj aktoroj staras sur scenejo, tiel bone ili ludis, entute 20 per-noj.

La sekvintan matenon okazis ĉe bela vetero kurso aŭtobuse al Bled (Veldes), kiu post-is al la partoprenintoj tre agrablajn memorojn.

Sed baldaŭ ni devis forveturi hejmen al strio; tre pezaj estis niaj koroj kaj nur la ero, en la venonta jaro revidi niajn blajn kaj gast-amajn jugoslavajn gesamide-ojn, konsolis nin iomete.

Otto Müller, Klagenfurt.

i persone ĝojas pri la bela sukceso kaj bedaŭras, ke mi pro la kongreslaboroj en n ne povis sekvi la inviton kiel pasintjare!

Steiner.

Aŭstria E.-Asocio sin tuj turnis al la prez. Olimpia Komitato en Aŭstrio s-ro ko-a konsil. d-ro Theodor Schmidt kun la , subteni la deziron de niaj japanaj goj. D-ro Schmidt informis nin, ke li e de Aŭstrio voĉdonos por Japanujo!

La prez. de AEA.

La juneco.

I.

Mi trakuris montojn,
arbaron traserĉas,
juneco la mia,
juneco la mia,
kie vi nur estas,
kie vi nur restas?

II.

Mi serĉas vin ĉiam,
kar-infan' el oro,
serĉas vin la koro
ĉiam, ĉiam, ĉiam,
ĉu trovos ĝin iam,
ĉu trovos ĝin iam?

III.

Pied' malfortiĝas,
la sopiro kreskas,
juneco la mia,
kie vi nur restas?
en distanc' ĝi estas,
malproksime restas!

IV.

Okul' jam ne vidas,
la brust' nur sopiras,
en distanc' ĝi estas,
malproksime restas,
vojo al juneco . . .

Albine Multrus (80-jara).

Esperanto en la Valencia Internacia Specimenfoiro.

Daŭrigante plurjaran kutimon, ankaŭ nun-e Esperanto havis standon en la „XIXa lencia Internacia Specimenfoiro (Hispanu-", kiu okazis dum Majo. En ĝi estis pre-ataj afiŝoj pri eksterlandaj similaj foiroj ankaŭ bildoj montrantaj la aplikon de la o al turismaj celoj. Samideanoj deĵoran-tie disdonadis propagandilojn al la vizi-oj. La stando aspektis bele kaj ĝi altiris n la atenton de la publiko.

„Esperanto Triumfonta", Semajna organo de la Esperanto-Movado. Eldonanto: Nederlanda Esperanto-Centro, Schiedamseweg n-ro 209 B, Rotterdam W., Ned. Redaktoro: A. C. van Ingen, Rotterdam. Abonpago: hfl. 0.50 aŭ 1.05 svisaj frankoj monate.

Certe dolore mirigis la esperantistaron, ke nia semajna „Heroldo" post la 27a numero tute subite, sen ia antaŭa informo, ĉesis aperi. La kaŭzo estas, kiel oni jam komunikis per aparta cirkulero, ke en Germanujo oni ne plu rajtas publike okupi sin pri Esperanto kaj sekve de tio ankaŭ la firmo „Heroldo de Esperanto" estis devigita likvidi.

Por plenigi la breĉon la oferema nederlanda esperantistaro komencas eldoni nun anstataŭe tiun suprenomitan ĵurnalon kaj donis al ĝi — por ne rompi la tradicion — la nomon „Esperanto Triumfonta", kiun nomon „Heroldo" havis en la komenco.

Al la nova organo ni deziras firman subtenon de l' tutmonda esperantistaro!

El Tutmondo.

Scienca pritraktaĵo kun E.-resumo.

La unua dana scienca pritraktaĵo kun E.-resumo „Aarsberetning" de s-ano Paul Neergaard, estro de Plantpatologia Laboratorio, Kopenhago, estu instigo al tiaj resumoj en sciencaj verkoj alilingvaj.

El la 8 paĝa teksto 1 paĝo en E.

Estas fondita asocio **„FRATECA ESPERANTISTA MOVADO"**, deziranta unuigi ĉiujn gesamideanojn, kiuj deziras efektivigadon de la nobla kaj frateca idealo de Zamenhof, enkorpigita en la „interna ideo". Ĉiujn 3 monatojn oni sendos al la aliĝintoj bultenon de la movado. Detalojn sendas al interesiĝantoj la Administracio de F. E. M., 4, rue Lamandé, Paris (17e).

El **Leningrad** ni ricevas la informon:

En la fabrikon „Ruĝa Velo" venis angla turistino, kiu vizitis ĉiujn 4 laboristin-ŝanĝojn kaj interparolis kun la laboristinoj. Ŝi ne komprenis ruse kaj ŝia tradukisto ne la anglan lingvon, sed nur Esperanton.

Vladimir Vladimirovic Majnov.

Tutmonda Fakadresaro 1936. Int. Ligo de la esperantista Poŝt- kaj Telegraf-Oficistaro eldonis en la E.-presejo A. Pražak, Jablonné n. O., ČSR., la unuan fojon en tia deca formo. 74 paĝa kun multaj adresoj kaj la bildoj de prez. Dufrenne, honorprez. d-ro Spielmann kaj la kunlaborantoj Musch, Lisac kaj Votrubec.

Francujo. Honorigo. Oni sciiĝas kun granda kontento pri la elekto kiel deputito al la franca parlamento de la prezidanto de la Universitata Esperantista Klubo en Lyon, **s-ro Philip**, profesoro en la jura fakultato. La esperantistaro kore gratulas al li.

Ekster ĉiuj politikaj vidpunktoj, estas ĝojige konstati, ke la rezultato de la franca voĉdonado de la 26. aprilo kaj 3. majo ne estis malfavora al la Esp-a movado, kaj, kontraŭe, alportas novajn esperkialojn. **Multaj novaj deputitoj estas konataj kiel esperantistoj aŭ simpatiantoj.** Verŝajne la Parlamenta Esperantista Grupo baldaŭ kunigos pli multe ol nun da niaj subtenantoj kaj tiel fariĝos pli potenca. Do ne estas momento por duboj, sed por pli vigla laboro.

Germanujo. Germana E.-Asocio eldonis la unuan serion da bildpoŝtkartoj kun du-lingva varboteksto. Temas prilokoj: Breslau, Flinsberg, Warmbrunn, Neisse kaj Landeck, ĉiuj en Silezio.

Hispanujo. Nova ŝlosilo en „baska" lingvo aperis laŭ la normoj de UEA, 39 paĝa kun flava kovrilo. Bona papero, bona preso.

Liechtenstein, kiu dank' al la klopodoj de nia mortinta direktoro Kreuz, tiel favoras E.-on, ĵus eldonis vere belan 10 paĝan gvidilon kun 15 belaj vidajoj. Ricevebla senpage de „Verband der liechtensteinischen Verkehrsvereine" en Vaduz.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Ŝtataj ekzamenoj por E-instruado kaj atesto pri E-kapableco.

Tiuj ĉi ekzamenoj komenciĝos m a r d e, l a 3. n o v e m b r o je la 8a horo per la skriba ekzameno en Ŝtata Instruistina Seminario en Wien, I., Hegelgasse 14. La tempo de l'praktikaj kaj buŝaj ekzamenoj estos al ĉiu ekzamenoto speciale konigata. La petskriboj pri allaso al la ekzamenoj, devas esti prezentitaj ĝis plej malfrue 19. oktobro 1936 ĉe la Direkcio de Ekzamena Komisiono, Wien, I., D.-Ignaz-Seipel-Ring (Stadtschulrat). La ekzamena takso (20 ŝ por la instruista ekzameno, 10 ŝ por E-kapableco) devas esti deponita antaŭ la komenco de l'skriba ekzameno.

Listo da verkoj rekomenditaj por preparo por la ekzameno kune kun la ekzamena regularo kaj preciza indiko de l'postuloj de la ekzameno, estas mendebla ĉe Bundesverlag en Wien, I., Schwarzenbergstraße 5 (3.— ŝ kaj 10 g) aŭ en iu librejo.

Serio-kursoj.

AEA intencas aranĝi nunvintre denove serio-kursojn per helpo de migrantaj E.-instruistoj.

Sin anoncu:

Grupoj aŭ unuopaj personoj, kiuj deziras en sia loko tiajn kursojn, kaj

samideanoj, kiuj estas pretaj kaj taŭgaj por gvidi tiajn kursojn. AEA

Aĉetu ĉe esperantistoj!

Atinginda kaj atingota celo estas, enkonduki Esperanton en la vendejoj: en ĉiu vendejo esperantoparolanta vendisto. Aŭstria Esperanto-Asocio pro tio intencas aranĝi en aŭtuno spezialajn kursojn por vendistoj. Jam nun vendejoj en Wien deklaris sin pretaj, akcepti Esperanton kaj fiksis pro ekkono verdajn stelojn sur la pordoj kaj elmontrejaj fenestroj. Por firmigi tiun sekceson kaj konvinki la koncernajn posedantojn de la vendejoj, ĉiu kongresano estas petata, aĉeti prefere en tiuj esperantemaj vendejoj. Detala listo aperos en la kongreslibro.

Melk (Vahaŭ). Ankaŭ en tiu ĉi turiste mondfama loko ĉe Danubo nia movado enradikiĝas, precipe dank' al la klopodoj de sam. **Karl Ehrenreich**, hotelposedanto tie. Sekve de noto en la antaŭlasta numero de „AE" pri E-kurso en Melk, vizitis nin grupo da Esperantistoj-biciklantoj el Neuda kaj priparolis la aŭtun-propagandon por nia loko, Neuda kaj Loosdorf, kie troviĝas multaj interesiĝantoj. En aŭtuno estos fondita klubo.

Waidhofen a. Thaya. Tie ĉi funkcias elementa kurso de E, 8 gekursanoj, gvidanto Fred. Pizl, vicdel. de UEA, lernolibro de Steiner. La kursanoj faras bonajn progresojn. — La Kongreson vizitos de Gr. Siegharts kaj de Dietmans 6 personoj, de Waidhofen proksimume 4.

Koran gratulon al
ges-anoj **Johann Schwarz** en Felixdorf
okaze de ilia geedziĝo.

S-ano Schwarz gvidis en 1935 la unuajn seriokursojn Lambach-Ebensee de AEA.

AEA

Nikolaus Prónay de Toth Próna et Blatnicza, kara samideano, ideala kaj nobla homo, mortis en Baden la 30. de junio. Li klopodis en Baden plivastigi E-on malgraŭ sia longjara malsano. Ni ne forgesos lin!

Recenzoj.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (vortaro germana-Esperanta) de d-ro Emil Pfeffer. Kvina eldono (17a ĝis 19a milo). 20.000 germanaj vortoj kun pli ol 30.000 Esperantaj tradukoj. 184 paĝoj da dense, en tri kolonoj presita teksto. Kun aldono enhavanta german-

Esperantan liston da plej uzataj nomoj propraj (personaj kaj geografiaj). — Eldonis „Tagblatt-Bibliothek", Wien, I., Wollzeile 20. Prezo 2.08 aŭ. ŝ.

La nova eldono de tiu ĉi konata vortaro estas denove zorge revizita kaj pliriĉigita je diversaj tak-esprimoj, krome enhavas tabelon de gramatiko kaj vort-formado en Esperanto. Ĝi estas nuntempe la plej disvastigita „meza" vortaro kaj ne bezonas plu ian specialan rekomendon.

Malgranda kor-Jesu-monato aŭ pensoj pri la reciproka amo inter koro Jesua kaj pia animo. Laŭ franca originalo verkis **Marie Erard**. Wien, 1936. 64 paĝoj. Prezo 50 groŝoj (afrankite ĉiu 1 respondkupono). Mendebla ĉe la aŭtorino, Wien, X., Alxingergasse 2.

La libreto traktas en apartaj ĉapitroj pri la unuopaj ecoj de la Jesu-koro: devoteco, pacienco, homamo, oferemo, fervoro, indulgemo, dankemo, fideleco ktp., ktp. Aldonita estas „Kor-Jesu-Kanto" de s-ino d-ro **B. Flasch.**

Norvega Kantareto. Kompilis Liv. Sandberg. Eldonis Norvega Esperantista Ligo. Oslo, 1936. 40 paĝoj. Prezo nemontrita.

Bona kolekto de ĝeneralaj kaj nordaj popolaj kantoj: krom „Espero" kaj „Tagiĝo" ni trovas la norvegan nacian himnon, svedan, danan, finnan naciajn himnojn kaj tutan aron da nordaj melodioj popolaj kaj de konataj verkintoj, Björnstjerne Björnson, Ibsen, Ivar Aasen, Jörgen Moe kaj aliaj.

Por Esperanto-biciklistoj:

Firmo Ullmann, Sobotka & Co, Wien, I., Operngasse 5, fabrikis E.-flagetojn, bona propagandilo!

S-ano P. H. Mooij, Teunisbloemlaan 19, Den Haag, Nederlando, ĉefdel. de UEA, informas pri nova bela propagandilo. Muntebla estas la nova emblemo; novarĝenta neoksidebla ringo ĉirkaŭas la blankemajlan platon diametre 35 mm. Videbla en la elmontra ŝranko en la halo de la kongresejo. La prezo proksimume, se oni mendas almenaŭ 50, po ŝ 1.50 kun afranko.

Sinj. Eric Parker-Yonwin, 5 Pine Avenue, Besses' o'th'Barn, WHITEFIELD, Lancashire, England, deziras korespondi **en angla lingvo** kun samidean(in)o el Salzburg aŭ Wien diversaj temoj. Respondo certigata.

Deziras korespondi: José Antonio dos S... tos, Rua do Olival n-126/2/E, Lisboa, Portug...

Kiuj volas helpi dekon da senlabo... samideanoj, sukcesigi Esperantan ekspozici... kun la celo plivastigi Esperanton, sendu E... ajn gazetojn, glumarkojn, ilustritajn kart... reklamilojn, turistajn gvidilojn ktp. al s-... J. v. d. Rhee, F 68. Alblasserdam, Nederlan...

Rememorante pri la Viena Kongreso ... deziros ion legi pri la Viena kuirarto. ... ĝi estas:

100 pikantaj panŝmirajoj

de Fr. Ruhm, kuirejestro.

Elgermanigis d-ro Sirk.

Ricevebla ĉe Ruhm-Verlag, Wien, VII., M... seumstraße 3. Tel. B-32-2-89. Prezo ŝ ...

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.

Ne sufiĉas **unufoje** veziti la Vienan vintrinkejon

„Heuriger"

Nur **post kelkfoja vizito** vi ekkonos la Vienan „Gemütlichkeit" (ĉarmon, gajecon, ĝojemon). **Karl Hengl, Grinzing, fin-stacio de tramlinio 38.**

La plej granda magazeno de Aŭstrio

TROTZ BILLIGKEIT · QUALITÄTSWAREN

A. Gerngross

AKTIENGESELLSCHAFT



Cabos

Memore al 28-a Universala Kongreso de Esperanto aĉetu donacon kun Esperanto-banto en jenaj bombon-vendejoj:

Vieno: I. ĉe Preĝejo de Sa. Aŭgusteno

I. Augustinerstraße 7

I. Opernring 21

I. Friedrichstraße 10

En la plej bela ĝardeno de Vieno

Kafej-restoracio en Burggarten

Neue Hofburg

malfermata de la 8-a ĝis la 24-a

Tel. R-27-1-88

„Paulus-Stube"

Wien, I., Walfischgasse 7

la plej antikva enurba vintrinkejo

„Heuriger"

Viena muziko de gekantistoj. Barelvinoj, varmaj manĝaĵoj. Malfermata ĝis la 4-a h.

Ehrbar-fortepiano

mondfama — nobla sono — solida

Wien, I., Parkring 18

Tel. R-23-2-34

Robert Knisch

Fabrikado de muzikiloj

Wien

I., Himmelpfortgasse 20

Carl Ceschka & Söhne

ĉapelfabriko

La ĉapelo „Esperanto"

Wien

VII., Kaiserstraße 123

Löwy & Co.

Fabrikado de vestaĵbukoj kaj butonoj el artkorno

Wien

XVI., Römergasse 35

Model-produktado Adele Groß

Vienaj manfaritaj trikaĵ-modeloj por sinjorinoj, sinjoroj kaj infanoj

Wien, VI., Barnabitengasse 9

„Esperanto-Sphinx"

kravato el unu peco de pura silko **ankaŭ kun la verda stelo** aŭ. ŝ 8.50 en modaĵ-vendejoj, **sinjoro!**

Edelmetallwerke A.-G.

antaŭe Wilhelm Tobias

Wien, Aŭstrio, 13., Kuefsteing. 17—19

Fondita 1870

Specialaĵo: Fabrikado de laŭmoda ornamaĵo ĉiuspeca laŭ Viena artmetia stilo el latuno, alpako nikelumita, kromumita, arĝentumita kaj orumita.

I. Blocksberg

Wien, VII., Neubaugasse 36

Fabrikado de oraĵoj kaj de unuarangaj belegaj pudrujoj kaj cigaredujoj el metalo.